

# AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ

Accademia  
Internazionale  
delle Scienze


International  
Academy  
of Sciences



San-Marino

Internationale  
Akademie der  
Wissenschaften

Académie  
Internationale  
des Sciences



<http://www.ais-sanmarino.org/arangxo/it/it20150830/>

## **Invito al kunsidoj de la Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro de AIS, de la Subtena Sektoro de AIS kaj de la membraro de IAW (AIS Germanio)**

Einladung zur Mitgliederversammlung der  
Internationalen Akademie der Wissenschaften e. V.

2015-08-31 (lundo), 14h00 / 14:00  
Rimini (IT), via Briolini, 48

**Scienca prelegsesio je dimanĉo, 2015-08-30**

Organizantoj: OProf. Dr. Reinhard Fössmeier, EProf. Dr. Sara Konnerth. Bonvolu konsulti nian retejon (adreso kaj punktokodo estas supre) por informiĝi pri la prelegsesio kaj pri aktualigoj.

**Invito** al membrarkunveno de AIS – Internationale Akademie der Wissenschaften (Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino) e. V. kaj al kunsido de la Ĝenerala Asembleo de AIS je merkredo, 2015-08-31, 14:00 – 15:00 en la ejoj de CER-ES, via Briolini 48, Rimini, Italio.

**Tagordo:**

- (1) Formalaĵoj (kvorumeco, voĉrajto, protokolo, tagordo)
- (2) Ĝenerala kaj financa raporto
- (3) Senŝarĝigo
- (4) Adaptado de la regularo
- (5) Elektoj
- (6) Buĝeto 2015 kaj 2016
- (7) Decidoj pri ŝanĝoj en la agado kaj strukturo de AIS
- (8) Decido pri proponoj el tagordero 1
- (9) Diversaĵoj

**Einladung** zur ordentlichen Mitgliederversammlung der AIS – Internationale Akademie der Wissenschaften (Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino) e. V. (vormals AIS Deutschland e. V.) sowie zur Vollversammlung des wissenschaftlichen Sektors der AIS am Montag, dem 31. August 2015, 14:00 – 15:00 Uhr im CER-ES, via Briolini 48, Rimini, Italien.

**Tagesordnung:**

- (1) Formalien (Beschlussfähigkeit, Stimmrecht, Protokoll, Tagesordnung)
- (2) Allgemeiner Bericht, Kassenbericht
- (3) Entlastung
- (4) Anpassung der Regularien
- (5) Wahlen
- (6) Wirtschaftsplan 2015 und 2016
- (7) Entscheidungen über Änderungen in der Tätigkeit und der Struktur der AIS
- (8) Entscheidung über Anträge aus TOP 1
- (9) Verschiedenes

Vieno / Wien, 2015-06-12, OProf. Hans-Michael Maitzen dr

**Invito** al kunsido de la **subtena sektoro** de AIS San Marino, kun elekto de nova estraro, je lundo 2015-08-31, 15:00 – 16:00 (post la kunsido de la ĜA). La tagordo sekvas la kunsidregularon:

- (1) Formalaĵoj (ĉeestanteco, kvorumeco, laborlingvoj, protokolo, tagordo, ĉeestrajto)
- (2) Ĝenerala raporto
- (3) Financa raporto, senŝarĝigo, AKU-kurzo
- (4) Decidoj pri proponoj skribe alvenintaj plej malfrue 24 horojn antaŭe
- (5) Kromaj tagordaj punktoj eventuale antaŭe anoncigitaj per invitletero aŭ deciditaj dum tagordero 1
- (6) Elektoj
- (7) Diversaĵoj.

**Anoncigitaj prelegoj**

OProf. Dr. habil. Věra BARANDOVSKÁ-FRANK: *Slaviconlangs*

Prof. Dr. Duncan CHARTERS: *Kion signifas poliglotismo por la lernado de Esperanto kaj por interŝanĝoj personaj kaj sciencaj?*

Assoc. Prof. Dr. Ioana CREȚU: *Aspekte der interkulturellen Kommunikation in Siebenbürgen*

OProf. Dr. Reinhard FÖSSMEIER: *Kiel komputiloj influas lingvojn. Anekdotaj notico*

Prof. ADoc. Dr. sc. Zlatko HINŠT: *Liberalizado kaj (de)regulizado en trafiko – prezaj influoj*

EProf. Dr. Sara KONNERTH: *Studadplanoj*

ADoc. Dr. Eugen MACKO: *Kio estas dialogiko?*

OProf. Dr. Hans Michael MAITZEN: *Ĉu CERES kaj ESPERANTO estas asteroidoj? Astroj kun rilato al ILo.*

OProf. Dr. Hans Michael MAITZEN: *Efikoj de la kalendara reformo 1582 („inter gravissimas“, de papo Gregorio la 13-a) al homaj institucioj/kutimoj kreitaj antaŭe.*

OProf. Dr. Carlo MINNAJA: *Historio de la esperanta literaturo. Prezento de ĵus aperinta libro.*

OProf. Dr. habil. Eva POLÁKOVÁ: *Tutmondiĝo, uzata lingvo kaj etiko de komunikado en amaskomunikiloj*

Jen mapeto pri la situo de CER-ES en la kvartalo *San Giuliano Mare* de Rimini. Ĝi estas nura skizo kaj montras nur iom gravajn stratojn. Ne dependu nur de ĝi por via orientiĝo. Ne miru, ke aliaj urbomapoj de Rimini parte orientiĝas tiel, ke nordo estas dekstre malsupre.



- **C** – CER-ES, via Giovanni Briolini, 48 (44,07057 N; 12,56522 E)
- SG – preĝejo de Sankta Juliano, la loka patrono
- SJP – preĝejo de Sanktaj Johano kaj Paŭlo, kun mozaikoj en la itala kaj Esperanto

**Publika trafiko en Rimini.** Tra *via Coletti* iras la aŭtobuso n-ro 4 (Marebello – urbocentro – stacidomo – *Via Coletti* – Torre Pedrera – San Mauro Mare). Ĝi veturas ĉirkaŭ kvin minutojn de la stacidomo al *via Coletti* kaj labortage trafikis ĉiujn 15 minutojn. La haltejoj estas numeritaj; la stacidomo estas numero 4, *via Briolini* situas meze inter la numeroj 7 kaj 8. La retejo de la buskompanio de Rimini estas <http://www.amrimini.it/>.

Inter la du bordoj de la haveno funkcias prameto (nur por personoj). Ĝi navedas inter la lumturo kaj la kontraŭa bordo.

**Vidindaĵoj en San Giuliano kaj Rimini.** San Giuliano [sanĝuljano] posedas modernan jahtan havenon kaj kvar kristanajn preĝejojn, inter ili la kirko de Sankta Juliano (ĉe la strato *viale Tiberio*), kun impresa altara bildo de Paolo Veronese kaj poliptiko de Bittino da Faenza. La kirko de s-taj Johano kaj Paŭlo havas mozaikojn kun skriboj en la itala kaj en Esperanto, kiujn igis meti pastro Duilio Magnani. Ĉe *via Madonna della Scala* estas restaĵoj de la urbaj muroj de Rimini.

La haveno situas inter San Giuliano kaj la centro de Rimini. Je ĝia suda fino estas la historia Ponto de Tiberio. Tra ĝi iam fluis la rivero *Marecchia* [marekja], kiu nun estas forkondukata kaj nord-okcidente iras ĉirkaŭ San Giuliano.

La urbocentro de Rimini posedas multajn vidindaĵojn, ekzemple la Arkon de Aŭgusto kaj la Malatesta-templon, nomatan de la lokanoj „Il Duomo“ (= la katedralo). Proksime de la stacidomo estas la restoj de romia amfiteatro. Parko Fellini, proksima al la maro, estas atingebla tra la strato *viale Principe Amedeu*, dekstre en nia mapo-skizo.

**San-Marino.** La ĵaŭdo tri tagojn post la kunsidoj, la 3-a de septembro, estas la nacia tago de la Respubliko San-Marino; tial komence de septembro tradicie okazas solenaĵoj, koncertoj kaj pafado per arbalestoj. San-Marino situas ĉirkaŭ 20 km de Rimini kaj estas atingebla per buso de la stacidomo. En tiu buso ne validas la busbiletoj de Rimini; oni pagas al la ŝoforo.

Ĉiuj informoj estas sen garantio.

### Kelkaj utilaj esprimoj en la itala lingvo

Esperante	Itale	Prononco
bonan matenon!	Buon giorno!	bŭon ĝorno
bonan tagon!	Buon giorno!	bŭon ĝorno
bonan vesperon!	Buona sera!	bŭona sera
ĝis revido!	Arrivederci!	arrivederĉi
pardonu!	Scusi!	skuzi
mi petas	per favore / prego	per favore / prego
dankon!	Grazie!	gracje
ne dankinde.	Di niente.	di njente
mi ŝatus...	Vorrei...	vorrej'
ni ŝatus...	Vorremmo...	vorremmo
– espreson	– un caffè	un kafe'
– kafon	– un caffè lungo	un kafelungo
– glaciaĵon	– un gelato	un ĝelato
– trinki ion	– bere qualche cosa	bere kŭalkoza
– mineralakvon	– un'acqua minerale	unakŭa minerale
– malgrandan bieron	– una birra piccola	una birra <b>p</b> ikola
– du grandajn bierojn	– due birre medie	due birre medje
– la menukarton	– il listino/ il menù	il listino / il menu'
la fakturon, mi petas.	Il conto, per favore.	il konto per favore
necesejo	Gabinetti	gabineti
– virinoj	– donne	donne
– viroj	– uomini	ŭomini
kie estas ...	Dove si trova ...	dove si trova
la stacidomo	la stazione	la stacjone
la hotelo ...	l'albergo ...	lalbergo
la bushaltejo	la fermata dell'autobus	la fermata de laŭtobus
la sesio de la akademio	la sessione dell'accademia	la sesjone de lakademia